ISSN:0871-9241

# NiaBulteno

OUTUBRO-DEZEMBRO 2011 OKTOBRO-DECEMBRO • Numero **92**

**Informa Bulteno de Portugala Esperanto-Asocio**

***Boletim Informativo da Associação Portuguesa de Esperanto***

Rua Dr. João Couto, 6-R/cA, PT-1500-239 LISBOA • +351 +217 141 359 • asocio@esperanto.pt • www.esperanto.pt



Anĉjo

## 25-a R.P.E. *Espinho*
Okt. 8-9, 2011

# Florojn fine de dorna vojo!

*Dimanĉa plaĝpromeno: (dekstren) Luís, Karlyn, Jozefo (sup.), Pinguinha (sub.), Nuno, Simplício (sup.), Alcino (mez.), M. Boieiro (sub.), Aurora, M.ª Boieiro, Juliana.* pĝ.6

## Ĉeestimpresoj

*Raportojn pri partoprenitaj aranĝoj kunĝuu elsur* **pĝ.6-8**

## Kursoj ekis!

*Gvide de Nádia kaj Iuri, entute 12 lernantoj ĉeestas nian sidejon por (plu)lerno ekde februaro:* **pĝ.9**

## Jen rehaveblas **la mankinta "Almejdo"!**

*Malfrua post promesoj kaj fruanoncoj, jen aĉeteblas noveldone la portugala--esperanta **vortaro** de A.S.Almeida:* **pĝ.12**

## IRO Sezimbre

*Neatenditaj malfacilaĵoj ne fiaskigos tamen la 9-an okazigon de ĉi iberia aranĝo: Certa IRo paskferie!* **pĝ.5**

## *Cifal obsik änolom-li?*

*Ĉu Zamenhof sciis volapukon? Gonçalo esploras:* **pĝ.8**

**Ĝenerala Asembleo marte** — kun malfrua honorigo pĝ.3

***Nia Bulteno*** (informa bulteno de **Portugala Esperanto-Asocio**)
Numero **92** (okt. - dec. 2011)
ISSN:0871-9241
**Redaktis:**
António Martins-Tuválkin
**Reviziis:** A. S. Almeida; Wilson Brígido; Iuri Gaspar
**Eldonkvanto:** 280 ekzempleroj
**Abono (4n-ra, nur al ekster PT):** ⅕ de via landa M.A. de U.E.A.
**Unuopa ekz. (89-92):** 5,00 €
**Rete:** http://www.esperanto.pt/dok/nb092.pdf
**Finkompostita en:** 2012.03.08
**Limdato por *NB*93:** 2012.04.02
**Kontakto:** ‹bulteno@esperanto.pt›

# *Nenion komunan* *inter la misnomataj "samideanoj" — krom la lingvon mem. Jen aserto evidenta (eĉ se de iuj bedaŭrata), pri kiu mi lasttempe ree memoris dum ekkontaktoj kun* ***novaj samlingvanoj****, kiuj, neakuze sed mistrafe, uzadas la vortumon «vi». «Vi», la estraro de P.E.A.; «vi», la* NB-*verkintoj; «vi», la portugaliaj aktivuloj; «vi», la esperanto-uzantoj ĝenerale. Nu, jen respondon insiste: Ekzistas nek «vi», nek eĉ «ni» — ja ni ĉiuj pensas, agas, decidas iel malsame, ankaŭ pri la lingvo, negrave ke ni ĉiuj parolas ĝin. Do, eĉ se «kun malsama penso en koro» ne timu tamen aniĝi al tiu ĉi bunta bukedo!…* **Red.**

**Portugala Esperanto-Asocio**
***Associação Portuguesa de Esperanto***
*(pessoa colectiva de utilidade pública)*
⦿ sabate 15:00-19:00; sideje
✉ Rua Dr. João Couto, 6 r/c A PT-1500-239 LISBOA
☎ +351 217 141 359
☎ +351 217 933 924 (pre-av.)
✉ ‹info@esperanto.pt› *(português)*
‹asocio@esperanto.pt› (esperante)
⌂ http://www.esperanto.pt/
⦿ ‹pea_diskut@googlegroups.com›

***CAE***: 91331 ***NIF***: 501 547 312
**Fondita** en 1972.04.25
**Landasocio** de U.E.A. ekde 1979
**Kom.-Obs.:** Faria de Bastos
**Membroj:** 128(+54) en 2011.09.02
**Monata kotizo:** 3,00 €
(emeritoj kaj sub-18-jaruloj: 2,00 €; malriĉuloj: 0,00 €)
**Aniĝkotizo:** 5,00 €
**Pagojn al bankkontoj:**
(***BIC***: CGDIPTPL) ***IBAN***: PT50 0035 064 000 025 961 430 49 **aŭ** ***NIB***: 0035 064 000 025 961 430 49

## *Gvidorganoj:* (ekde 2011.03.26)

***Ĝeneral-Asemblea Stabo:*** ‹asembleo@esperanto.pt›
**Prezidanto:** Alexandra Paz
**Sekretarioj:** Rui Q. Valério
Francisco Melo

***Estraro:*** ‹estraro@esperanto.pt›
**Prezidanto:** José Martins
**Vicprezidanto:** Wílson Brígido
**Sekretario:** ‹sekretario@esperanto.pt›
Iuri Gaspar
**Kasisto:** ‹kasisto@esperanto.pt›
Vítor Marques
**Voĉdonantoj:** Luís Oliveira
A. Martins-Tuválkin
Nuno Magalhães

***Kontrol-Komitato:*** ‹kk@esperanto.pt›
**Prezidanto:** A. da Silva Almeida
**Revizoroj:** Alcino Alves
Miguel Boieiro

## *Nebalotitaj Postenoj:*

**Lernado:** ‹lernado@esperanto.pt›
Nádia Penas
Iuri Gaspar
**Libro-Servo:** ‹vendejo@esperanto.pt›
Rui Q. Valério
**Biblioteko:** ‹biblioteko@esperanto.pt›
Wílson Brígido
**(periodaĵoj)** Wílson Brígido
**(eltondaĵoj)** Martins-Tuválkin
**(diversaĵoj)** (vakas)
**Gazetaro:** ‹imprensa@esperanto.pt›
(vakas)
**Eldonoj:** ‹eldonoj@esperanto.pt›
A. Martins-Tuválkin
**Subvencioj:** (vakas)
**Ekspozicioj:** (vakas)
**Komputservo:** ‹admin@esperanto.pt›
Nuno Magalhães
Luís Oliveira
A. Martins-Tuválkin
**Fotarkivo:** (vakas)
**Sidejmastrumo:** Pedrosa Alves
**Poŝtmarkoj:** Armando Cardoso

## *Honoraj Membroj:*

António da Silva Almeida
Alsácia Fontes Machado †
Manuel de Freitas †
Alberto Pedro da Silva †
Adelino Franco Simões †
Manuel de Sousa Teixeira †

## *Junulara Sekcio:*

**Portugala Esperanto-Junularo**
***Jovens Esperantistas de Portugal***
**Fond.:** 1993 **Membr.:** 10
(L.S. de TEJO ekde 1996)
⌂ http://www.esperanto.pt/pej.htm
✉ ‹pej@esperanto.pt›
⦿✉☎ ĉe P.E.A.

## *Lokaj Sekcioj:*

**PLUS — Portugala Loka Unua Sekcio** (nordokc. sekcio; neag.)
**Repr.:** Nuno Magalhães
**Fond.:** 2002 **Membr.:** 21
⦿ Kafejo *Estrela d'Ouro*, str. *Fábrica*, Oporto (antaŭavertu!)
✉ (provizore ĉe P.E.A.)
☎ +351 917 721 868
✉ ‹plus@esperanto.pt›
⌂ http://www.esperanto.pt/plus.htm

## Aliaj Landaj Organizoj:

**Regiona Esp.-Asocio (*Ourém*)**
⌂⦿✉☎: (anoncotaj; *NB*90:4)

**Saluton! — *Cooperativa dos Amigos do Esperanto e da Natureza***
✉⌂ Avenida Bissaia Barreto, 2 PT-3360-191 PENACOVA

## Landaj Reprezentantoj:

**U.E.A.:** Manuel Pinguinha
**TEJO:** (vakas)
**E.E.U.:** Luís Ladeira; José Martins
**ILERA:** Francisco Melo (CT1CGE)
**EJA:** Faria de Bastos
**SAT:** Pedrosa Alves (kotizp.)
**IKEK:** Alcino Alves

## *Numeroj kaj Referencoj*

Ekz.: «*NB***12**:3-4» indikas pĝ. 3 ĝis 4 de *Nia Bulteno* n-ro **12**. Aliaj: *Bb* (*Bubo*); *IL* (*Informa Letero*); *ELV* (*Esperanto — Língua Viva*); *NS* (*Nia Stelo*); *LK* (*La Karavelo*); *RPE* (*Revista Portuguesa de Esperanto*); *SI* (*Saudação Informilo*).
**Sgnf. de logotipo kun numero:** ★1234/567 aŭ ★1234: asociano; ★12.345: libro-serva varkodo; **bibl.:** ★B1234 aŭ ★BA123: libro k.s.; ★i123: periodaĵo; **albumoj:** ★F1234: foto; ★G1234: eltondaĵo.

HOMOJ:

# *Olgaj facoj*

ASA



ASA



Kasesa



La gravecon de Olga Almeida (*NB***91**:17) en la historio de nia asocio ne plene komprenis la nova generacio de aktivuloj ape-

➘ *R.P.E. 1981* (IL*27*:*1*)
➘ *ILEI-konf. 1983* (IL*37*:*1*)
⇐ *Ĝ.A. 2005* (NB*87*:*3-4*)

rintaj ĉ. 1985-1989, ĉar tiam ŝi estis retiriĝinta el **plentempa** movadumado, al kio, malkiel ŝia edzo, ŝi ne revenontis. Tial, nemalice sed maljuste, oni ne pensis atribui ankaŭ al ŝi honormembrecon en 1999 (*NB***76**: 6-8). Tiun eraron, eĉ se malfrue, ĝustigos la nunjara Ĝ.A. *AMT*

ASSOCIAÇÃO:

## *Assembleia Geral dos sócios da Associação Portuguesa de Esperanto*

# *Aviso Convocatório*

Nos termos do artigo 22º dos estatutos desta Associação, convoca-se a Assembleia Geral para reunir em sessão ordinária no próximo dia 31 (trinta e um) de março, sábado, pelas quinze horas, na sede da mesma, sita no rés-do-chão A (á) do número 6 (seis) da Rua Dr. João Couto, ao Calhariz de Benfica, em Lisboa, com a seguinte ordem de trabalhos:

1. Apreciação e votação do Relatório e Contas referentes ao ano de 2011, ouvido o parecer do Conselho Fiscal.
2. Apreciação e votação de proposta de atribuição da categoria de Sócia Honorária, a título póstumo, a Olga Serra Marques de Almeida, sócia fundadora, apresentada pela direção.

Fica desde já convocada a Assembleia Geral para reunir trinta minutos mais tarde, no mesmo local, se à hora marcada não se tiver formado quórum.

Lisboa, 1 de Novembro de 2011
Pel'A Presidente da Mesa,

os secretários
***Rui Queiroz Valério** e **Francisco Dias Melo***


LIBROJ:

# Nature kaj "mojose"

La portugallingva esperanto-lernilo *O Esperanto é fixe* (*NB***91**:26: João José Santos; La Karavelo: Lisbono, 2011; 44 pĝ. 297×210 mm²; ISBN 978-989-96312-1-2) prezentiĝis en 2011.10.15 en *S.P.N.* (*NB* **91**:9), kiel parto de ties 99-jariĝfesto. *AMT*

ASOCIO:

*Post NB*63*:6, jen la **nombro de ĉeestintoj kaj reprezentitoj** en ĉiuj kunvenoj de la Ĝenerala Asembleo de P.E.A. (⊛fonda, ⊚ ordinaraj, ⊗eksterordinaraj, ⊕sesidaŭrigaj) kaj **ono** de tiama anaro.* ***AMT***




HOMOJ:

# *Gastojn sideje*

*Depost ĝistiama sciigo (*NB*88:4), multaj eksterlandaj esperantistoj vizitis nian sidejon, kvankam, pro nia forgeso, ne ĉiuj subskribis la gastlibron. Riskante mistreti la limon inter privato kaj noticindo, jen kompletiginda listo: (**Ĵuse:** vd. ankaŭ pĝ. 10.)*

2008.05: (Instigita de Rut en *Roskilde*-Festivalo, Danio), belgo **Ben Indestege** trapasis Portugalion de Alenteĝo ĝis Minjo: «Lisbono estas speciale bela kaj bonkora! Mi certe revenos, eble eklogôs ĉi tie.» *JJS+AMT*

2008.07: geparo **Hèctor Alòs i Font** (Barcelono) kaj **Irina Stomenskaâ/Ирина Стоменская** (Ĉeboksaro), konataj movadanoj, vizitis Lisbonon kie i.a. renkontiĝis kun malnovaj amikoj.

2008.08: Du tagojn noktumis **Antonio Valén**, konata hispania aktivulo, sideje inter libroj kaj amikoj.

2008.08: **Leonardo Pampaloni** (Italio; *NB*89:13) vizitis la sidejon.

2008.08: **Nicole Blot** (Francio) kaj edzo traveturis la landon nordsuden.

2008.08: Triopo el la antaŭa "nova generacio" de junaj katalunoj — **Lluis Garcia**, **Ferran Sala**, kaj **Carles Alós** — vigligis sidejan sabaton.

2009.06-11: Angola lignskulptisto **José Baxombana** gastis en Portugalio kelkajn monatojn dum kiam li bonvole kunlaboris en diversaj sidejaj taskoj.

2010.09-: Irana ĵurnalisto **Amir Fehkri / امیرفکری** (*Amẏr Fg̓rẏ*) lisbonianiĝis kaj de tiam disofte vizitas la sidejon.

2011.04: Voje de jam trijara mondvojaĝo, juna japana esperantisto **Yasutora Fujii / 藤井 泰虎** gastis en nia sidejo, kie lia neordinare bonega rego de esperanto ĉiujn impresis. *AMT*

ARANĜOJ:

# *IRon, certe!*

Planita por Sezimbro, la tria portugalia IRo (*NB* **91**:3) frontis dekomence organizproblemojn pro manko de taŭga ejo — aŭ fakte pro malemo de la loka registaro ĝin peri aŭ provizi. La klopodado tamen daŭras kaj, eĉ se ĝis la antaŭtago ne eblos certi pri la fina gastigaranĝo, certas tute kontentiga lastalternativa solvo. Interesatoj nepre aniĝu ĉe esperanto.pt/ir2012 kaj certu pri laŭkutime interesa programo. La paskan semajnfinon (2012.04.05-08) venu do al Lisbonio por la Klifa Plonĝado! ***AMT***

ASOCIO:

# *Pri endoj kaj ebloj*

Okazis la unuan februaran semajnfinon de la jam fora 2007 en la sidejo de P.E.A. **Movada Seminario** organizita de la estraro. Al ĉiuj portugaliaj esperantistoj kun sperto aŭ potencialo pri movadaj taskoj estis sendita invito, sed rezulte finfine povis ĉeesti plentempe nur sepo (plejparte estraranoj) el ĉ. trideko (⬇). Eĉ tiel la dutaga sesio permesis ritmon kaj "spiriton" aliajn ol kutima estrarkunveno, kaj pri nia agado estis diskutita temaro pli vasta, kaj ties sekvoj kaj limoj analizitaj pli profunde. Ĉion kio estis entreprenita poste, flanke de la ĉeestintoj, la tiamaj pensigaj diskutoj influis, eĉ se ne eblis (ankoraŭ) plenumi ĉiujn pridiskutitajn agadojn. Jen la pritraktita temaro:

sab. 13:20: **Regiona agado**: Lokaj Sekcioj; estrarapogo, kontaktigo de izolitoj, loka ejo (renk., kurs.).

sab. 16:00: ***Nia Bulteno***: neekspedo laŭpeta (*NB*90:15); akurato kaj ofto; kunlaboro; buĝeto; interŝanĝoj; enhava temaro.

sab. 16:40: **Paĝaro**: retnomo; enhavo; paralele novan motoron (*NB***93**).

sab. 16:50: **Libro-Servo**: helpanto / anstataŭonto (*NB***90**:5); enaranĝa vendo; katalogo, retvendo (*NB***93**).

sab. 17:10: **Aranĝoj**: R.P.E., Ĝ.A., Zf; HEK, K.K.E., IRo; eblo U.K., I.J.K.

sab. 17:55: **Sidejo**: Purigbrigado (*NB* **90**:20), konservado; plibonigoj.

sab. 18:07: **Biblioteko**: (*NB***90**:19) Mebloj; istoj/estro; katalogo, pruntoj; diversaĵa fako, gazetaro, libraro.

sab. 19:00: **Junulara movado**: PEJ--anaro, -regularo, TEJO-aneco.

dim. 12:15: **Instruado/Lernado**: reta memlernado, Lernu.net; kursoj sidejaj, eksteraj, intensivaj, aliies; emeritoj, informpetintoj; inventaro de materialo; ILEI--ekzamenmodeloj, diplomoj.

dim. 15:25: **Informado**: prospektoj, retejo, panelaro, *E.L.V.*, informa libro (Valén); eltondaĵoj, gazetara servo; retlistoj. ***AMT***



MARTA



MARTA



MARTA

*Seminarianoj ĉirkaŭtable: Xana, Vesperto, Kapitano, Wilson, Jozefo, Alcino, kaj Ancxjo.*

ARANĜOJ:

# Espinho: *Florojn post dorna vojo!*




Ancxjo

**Ancxjo**

Estis al mi tre agrable ĉeesti kaj ani la **25-an Renkontiĝon de Portugalaj Esperantistoj**, en *Espinho* (nordokcidenta Portugalio), en 2011.10.08-09. Kiel pozitivaĵoj vicas la ĉeesto de kelkaj ĝis tiam nekonataj homoj, kaj la perfekta vetero, kun bluega ĉielo kaj varma sufiĉe eĉ por nokta plaĝumado.

Kiel negativaĵoj notendas la surpriza malesto de tro multaj ĉeestontoj (pro kio eĉ forfalis ĉ. duono de la planitaj programeroj — ĉeestis entute 17 homoj), kaj la improvizeco de la organizo. Pri ĉi lasta kulpas Nuno Magalhães kaj José Martins nur je tio ke ili akceptis taskon kiu fine ŝanĝiĝis de ĉeforganizado al solorganizado. Eĉ tiel, la solvo okazigi la endoman parton de la programo en restoracio anstataŭ en mosta salono nenion malhelpis.

Post la tagmanĝo, do, dum funkciadis ankaŭ improvizita libro-servo (kie deĵoris bonvole Luís Oliveira kun subteno de Juliana Santos), ekis la salona programo per anstataŭa prelego eldirita de mi pro malĉeesto de Emídio Gardé, trafita de tre grava sanmalhelpo; la temo estis la loka etŝpura fervojo Voŭga Linio kaj ankaŭ ĝenerale pri etŝpuraj fervojoj en Portugalio; sekvis mallonga kolokvo pri la temo.

Sevkis ĥora kaj deklama prezento de la ĉeestantoj el *Figueira da Foz*, gvidataj de la senlaca Antónia Carvalho, al kiuj kuniĝis voĉe Karlyn Salazar (↖ denaska esperantisto el Kostariko, nune studento en Oporto) kaj gitare bragancano Simplício Moura. Inter la figejranoj (↑) notindas malnova esperantisto Elísio Silva kiu tiel revenas al movada kontakto.

La posttagmezon finis prelego de José Martins pri la erozio en la centra marbordo de Portugalio, kaj pri ties kaŭzoj, efikoj, kaj solvoj — temo pri kiu li posedas profundan scion kaj sperton. Post plia mallonga kolokvo pri la prelegtemo, foriris kelkaj renkontiĝanoj kaj restis por tranokto kaj dimanĉa promeno nur 12 homoj.

Dimanĉe matene ni promenis norden ĉe la marbordo sur ligna stilza su(pe)rduna irejo: Survoje Alcino Alves klarigadis pri la loka flaŭro, pri ties nomoj kaj ekologiaj ecoj — per siaj kutimaj vervo, gajo, kaj klero, kun okaza kontribuo de aliaj renkontiĝanoj, ĉefe de Miguel Boieiro (↖), ankaŭ fakulo pri tradiciaj plantuzoj. La reveno suden okazis ĉ. la tagmezo, spronita de malsato, post iom da nudpieda plaĝumado kaj tajdflakesplorado.

Post tria komuna manĝo (en la sama, gastigema restoracio), la grupo malrapide disvojis, kun adiaŭoj ĝis la sekva okazo (pĝ.8). ▮

ARANĜOJ*:

1973 **RPE** *Coimbra*
1974 **RPE** *Montemor-N.º*
1975 **tejo** *Coimbra*
1975 **RPE** *Porto*
1976 **RPE** *Lisboa+Cascais*
1977 **RPE** *Caldas da Rainha*
1978 **RPE** *Coimbra*
1979 **RPE** *Porto*
1980 **RPE** *Setúbal*
1981 **RPE** *Faro*
1982 **RPE** *Caldas da Rainha*
1983 **RPE** *Santo Tirso*
1983 **ilei** *Sintra*
1986 **RPE** *Lamego*
1986 **koo** *Penafirme* TVD
1988 **Z-f** *Caldas da Rainha*
1989 **RPE** *Castelo Branco*
1989 **Z-f** *Lisboa*
1990 **RPE** *Aveiro*
1990 **Z-f** *Évora*
1991 **Z-f** *Olhão*
1992 **APl** *Cacela* VRS
1993 **Z-f** *Lisboa*
1994 **RPE** *Lisboa*
1994 **APl** *Troia* GDL
1995 **APl** *Troia* GDL
1996 **RPE** *Vizela*
1996 **kek** *Lisboa*
1997 **RPE** *Barreiro*
1997 **APl** *Maceira* TVD
2000 **RPE** *Alcochete*
2001 **pej** *Maceira* TVD
2002 **ngs** *Campo do Gerês* TBR + *Braga*
2002 **ngs** *Serra da Freita* VLC + *Arouca*
2002 **ngs** *Gafanha do Carmo* ILH
2003 **Reg.Ĝ.A. + ekzm.** *Gafanha do Carmo* ILH
2003 **RPE** *V. F. Xira*
2004 **ngs** *Rio d'Onor* BGC
2004 **RPE** *Tábua*
2005 **ngs** *Valença*
2005 **RPE** *Alcácer do Sal*
2005 **Z-f** *Lisboa*
2006 **IRo** *Ar.ª Branca* LNH
2006 **RPE** *Aveiro*
2007 **RPE** *Figueira da Foz*
2008 **RPE** *Alcochete*
2009 **IRo** *Porto*
2009 **Z-f** *Lisboa*
2010 **Z-f** *Penacova*
2011 **RPE** *Espinho*
2011 **Z-f** *Leiria*
2012 **IRo** *Sesimbra*
2012 **RPE** **Zf** (anoncotaj)

**(*)** Movadaj aranĝoj en Portugalio ekde 1972 (*NB***87**:9); neinkl. porpublikaj, nek sidejaj aranĝoj. **APl**: Atlantika Plonĝado; **ilei**: Konferenco de ILEI (Int. Ligo de Esp.-Instruistoj); **kek**: Konferenco de KEK (Komunista Esp.-Kolektivo); **koo**: ekskurso de Koop. "Saluton!"; **ngs**: ekskurs. Nogeso (*NB***91**:4); **RPE**: Renkontiĝo de Portugalaj Esperantistoj; **tejo**: TEJO-seminario; **pej**: Aranĝo de PEJ; **Z-f**: Zamenhoffesto. *AMT*

ARANĜOJ:

# *Jarŝanĝon JESe*

***Nuno Magalhães****

Okazis en *Gdańsk*, Pollando, la ĉijara JES — Junulara Esperanto-Semajno, organizata de poloj kaj germanoj. JES estas kunigo de iliaj iamaj A.S. (Ago-Semajno) kaj I.S. (Internacia Seminario; *NB***87**:7-9), okazigata alterne en ambaŭ landoj. (Celatas regiona vastiĝo, kiel okazintis kun A.S. en Slovakio.) Ĉijare partoprenata de 174 homoj el 27 landoj, JES ebligis al la poloj ree sin montri kiel kompetentaj organizantoj kaj ege agrablaj homoj. Ĝi okazis en lernejo, tranoktis mi en amasejo, kaj manĝis bonajn polajn manĝaĵojn.

*Gdańsk*-on mi vizitis kaj en ĝi mi amuziĝis per ĉiama kongresetoso. Ŝatis la urbon, ŝategas polojn. Estis urbaj vizitoj (kaj renkontiĝo kun Lech Wałęsa), estis prelegoj, estis novjara festo kaj ties ĉiu-horzonaj ĉampanumadoj, estis koncerto de "Perdita Generacio" (aŭ tiama parto de ĝi), estis iu ĥanco kiu kredis sian surscenaĵon arta kaj apartenas al tiu forpafinda grupo kiu taksas sin La Alternativaj Stilozuloj ĉar ili kvazaŭ libereceme parolas pri sekso (ĉefvorto: "parolas"). Perdita generacio plaĉis.

Entute tamen, malgraŭ tio ke mi, kiel ĉiam, ŝategas polajn aranĝojn, estis nenio aparte nova por tiu-epoka renkontiĝo.

* Duonebria aŭtoro verkis apenaŭ ripozinta.

ARANĜOJ:

# *Z-festa omaĝo*

*Alcinda Carvalho naskiĝis en* Leiria *la 31-an de Januaro 1903-a, kie ŝi loĝis dum la plejparto de sia vivo kaj kie ŝi mortis la 6-an de Oktobro 1991-a.*

*De infanaĝo ŝi havis grandan emon lerni kaj ŝi iĝis brila lernanto. Ŝi licenciiĝis pri Fizika kaj Kemia Sciencoj kaj Farmacio; ŝi ankaŭ frekventis Medicinon.*

*Krom la portugalan lingvon, ŝi flue parolis la hispanan kaj la francan; ŝi lernis ankaŭ la araban, la aramean kaj esperanton.*

*Amanto de artoj, ŝi lernis ludi viololon kaj verkis poezion ekde la 11-a jaraĝo. Dum ŝi studis en* Coimbra, *ŝi partoprenis pro invito en la ĉefpreĝeja ĥoro, kie ŝi solokantis.*

*Ŝi dediĉis sian vivon al instruado — en* Leiria, Coimbra, Fátima, *kaj* Lisboa; *dum kelkaj jaroj, ŝi krome faris klinikajn analizojn en sia hejma laboratorio.*

*Dum ŝi loĝis en* Lisboa, *ŝi fariĝis membro de la Portugallingva Societo kaj de P.E.A., kie ŝi oficis kiel estrarano.*

*Ŝi ne edziniĝis kaj, pro tio, ŝi dediĉiĝis al siaj nevinoj, al la lernantoj, kaj al la malriĉuloj. En 1981 ŝi ricevis la ordenon* Grand Prix Humanitaire de France.

---

Eta biografio laŭtlegita en esperanto de ŝia pranevo Nuno Rafael Figueiredo, en la lejria placeto kiu portas ŝian nomon, okaze de la Zamenhoffesto de 2012 (*NB* **91**:4), antaŭ trideko da esperantistoj kaj familianoj.

LINGVO:

# *Pri Zamanhof, esperanto, kaj* volapük

Omaĝe al la 80-jariĝo de Claude Gacond, konata svisa aktivulo, fondinto kaj ĝisnuna motoro de CDELI ([1]), Edition Iltis eldonis festlibron ([2]), al kiu kontribuis 22 diverslandaj aŭtoroj per artikoloj precipe esperantologiaj kaj interlingvistikaj. Inter ili enviciĝas ankaŭ portugalo Gonçalo Neves per sia 40-paĝa studo Zamenhof kaj *Volapük*. Konsultinte 86 bibliografiajn unuojn (inter ili 18 el la plumo de Bernard Golden, kies iamajn vervajn artikolojn la legantoj de *NB* certe memoras), Gonçalo provis respondi jenajn tri demandojn:

**(1)** Ĉu Zamenhof konis *Volapük*on jam en 1887, kiam aperis la *Unua Libro*?

**(2)** Kiam kaj kiom li konatiĝis kun ĝi?

**(3)** Ĉu *Volapük* iel influis la manieron, kiel Zamenhof kreis Esperanton?

Ne malgrandan parton en lia studo (kiu cetere baldaŭ aperos kiel aparta broŝuro ĉe Iltis) okupas historia analizo, ĝis nun farita de neniu, pri la *Volapük*-aj vortoj, kiuj sidas en la fama ĉitema traktaĵo de Zamenhof ([3]).

Aldonan frandaĵon en la menciita festlibro konsistigas faksimila publikigo (kaj parta traduko, fare de Irmi Haupenthal) de ĝis nun nekonata franclingva letero de Louis de Beaufront adresita je 1905.06.23 al la pariza matematikisto Charles Laisant, kie la markizo i.a. anoncas sian intencon demarŝi por nobelpremiigo de Zamenhof! ***NL***

---

([1]) La Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia estas planlingva fako en la urba biblioteko de *La Chaux-de-Fonds*, Svislando. Fondita en 1967, ĝi fariĝis la ĉefa arkivejo, studejo kaj klerigejo ĉi-tema kaj ankaŭ ŝatata renkontejo por interlingvistoj kaj diversplanlingvaj aktivuloj.

([2]) *Instrui Dokumenti Organizi. Fest-libro por la 80a naskiĝ-tago de Claude Gacond*. Editoris Irmi kaj Reinhard Haupenthal. Edition Iltis: Bad Bellingen, 2011. 392 p. isbn 978-3-932807-93-0.


([3]) "Esperanto kaj Volapük" *La Esperantisto* **1**: 2-6 (1889); **2**: 9-12 (1889); **4**: 25-27 (1890); **7**: 37-38 (1890).

LERNADO:


# *Sidejkursoj ekis*

Post longa malfruiĝo ekis la planitaj sidejkursoj (*NB***91**:25) la lastan semajnon de februaro, tuj post la ricevo de la elektitaj kurslibroj: *Esperanto em método ilustrado*, de Stano Marček kaj I. Ávila (1-a grado; *NB***91**:26; ★02.062: 7,50 €), kaj *Faktoj kaj Fantazioj*, de Marjorie Boulton (2-a grado; ★08.156: 13,20 €). Ĉeestas naŭ lernantoj en la unua-grada kurso, instruataj de Nádia Penas lundojn vespere, kaj tri en la dua-, de Iuri Gaspar mardojn vespere. Ĉifoje, 3-a grado ne okazos. *AMT*

HOMOJ:



R.R.



R.R.

**Manuel** Arnaldo **Marreiros** (Faro; nask. 1917; ★1011↗), forpasis en 2007.04.14. Jam okaze de asocia kontakto en 2005.05.21 li deklaris sin telefone (en tre bona esperanto) «tute ne bonfarta», kaj jam longe ne povis eldomiĝi. Post la forpasoj de Raimundo (*Portimão*; *NB***80**:19) kaj Terramoto (*Olhão*; *NB***90**:3), tiel ĉi plene malaperas la antaŭa generacio de algarvaj esperantistoj.

Augusto **Pereira Júnior** (*Alhos Vedros* mta; 1930-2006; ★0222↘). En lia esperantista vivo notindas i.m.a. deksemajna aŭtvojaĝo tra Eŭropo (*NB***51**:8-9) kaj esperantistigo de Iuri Gaspar. *AMT*

INFORMADO:

# *Farita la Far'*

Laŭinvite de tiea instruisto pri la angla lingvo, okazis la 28-an de oktobro 2011 prelego pri esperanto en la mezlernejo *Tomás Cabreira* de la sudportugalia urbo Faro. Prelegis, kun aparta atento al la demando pri internacia komunikado, al ties historia kaj nuntempa signifo, al planlingvoj diverstipaj, kaj al esperanto mem, António Martins-Tuválkin, en… la angla lingvo. La inviton spronis ero de la deka-lernjara programo pri angllingva instruado kiu, kiel sciate, kovras internacian komunikadon, kaj ĉe kiu iuj lernlibroj enhavas mencion pri esperanto. La prelego bone okazis, daŭris precize la antaŭviditajn 90 min., kaj kelkaj el la ĉ. cent ĉeestintaj lernantoj restis poste por pliaj demandoj; ankaŭ la tri ĉeestintaj instruistoj tre ŝatis la rezulton de tiu ĉi komuna klopodo. Malgraŭ anticipa sciigo al manpleno da lokaj esperantistoj, la preleginta estrarano povis renkontiĝi kun nur unu delonga interesato/komencanto. *AMT*

HISTORIO:

# *Volonte sub lupeo*

Longe sentiĝadis inter ni la manko de profesia kaj sistemeca okupiĝo pri la historio de la movado nia-lande: Dise unuopuloj publikigadis memuarojn kaj intervjuojn, atendantajn koheran analizon. Oktobre 2011 venis al ni elekster la esperantistaj vicoj serioza interesiĝo flanke de sociologia magistriĝanto de *ISCTE*, d-ro Sónia Apolinário, kiu jam komencis traesploron de niaj arĥivoj kaj baldaŭ ekintervjuos. *AMT*

APLIKADO:

# *Insisti cisoceane*

João José Santos (Ĝoano, iame Johano) estas kaj restas ekde 1985 la plej aktiva apoganto de esperanto en la spiritista medio nia-landa — eblas diri ke, krom sporadaj esceptoj, li estas la sola. Tio estas des pli surpriza se oni konsideras la gravecon de Brazilo en la nuna spiritismo kaj la gravecon de tiu religio en la brazila esperanto-movado. Sed verŝajnaj influoj perutaj de komunaj lingvoj tamen ne okazas. Historion de sia agado (i.a. *NB*80:8) kaj informon pri ĵusaj klopodoj Ĝoano raportas en *LK*16:3-4, kaj pri notinde longa diskutfadeno en spiritisma forumo, publike legebla ĉe http://www.forumespirita.net/fe/estudos-mensais/%28estudo-maio-09%29-esperanto/. ***AMT***

***Ĵuse:*** Ĉeestinte januare 2012 la **Brazilan** Esperanto-Kongreson, **Ĝoano** decidis **eklôĝi** kaj movadumi tie — kie *La Karavelo* plu aperos (*LK*26 aperintis oktobre).

LIBROJ:


# *Poemaro fajristeje*

La 22-an de januaro plian fojon prezentiĝis la dulingva poemaro *Meridianos* / *Meridianoj* (*NB*91:32), ĉifoje kadre de monata sesio de la poeziamanta debatgrupo “*Kava Café*” en la fajristejo de *Queluz* str, kun ĉeesto de ties aŭtoro, Henrique Madeira, kaj de la kompostinto Martins-Tuválkin — kiuj deklamis ambaŭlingve kelkajn poemojn; (bedaŭrinde pro misinterkonsento ne ĉeestis la tradukinto A. S. Almeida). Ĉeestis ĉ. 30 grupanoj, literaturemuloj lisboniaj, kies intereso pri esperanto noteble akriĝis. Ekzemplero estis donacita al la organizantaro, cele al jara konkurspremio (aljuĝota de la loka pensiula libertempa kursejo *Unique - Univ. Sénior de Queluz*, kie esperanto iam instruatis: *NB*90:14), kromaj ekzempleroj disvendiĝis. ***AMT***

KULTURO:

# *Filozofias koloroj*

Vizitis Lisbonon fine de februaro 2012 japana pentristo Aihara Misa (相原美紗), okaze de ekspozicio de ŝia verkaro en la kastelkvartala *Galeria Colorida*, vizitebla ĝis 2012.03.16. Ŝi ankaŭ havis okazon viziti nian sidejon plurfoje, kie eblis al la novaj kursanoj (pĝ. 9) konatiĝi kun interesa eksterlanda esperantisto. Al nia biblioteko ŝi donacis ekzempleron de sia belega prezentkatalogo *Filozofias Koloroj* — trilingva japane, esperante, kaj angle, kiel ŝia retejo http://www5d.biglobe.ne.jp/~uam53283/. Ŝi eklernis esperanton 14-jara kaj diplomiĝis pri belarto kaj desegno en 1970; ŝi ekspoziciis en Tokio, Londono, *Berkeley* (US), Ateno, *Biella* (IT), Hamburgo, Kioto, Osako, Florenco, kaj nun Lisbono. ***AMT***



Aihara Misa (*La mano*)

APLIKADO:

# *R.V. baldaŭ 200*



R.R.

R.V. aŭ Radio Verda estas radio, kreita de Karlina kaj Arono (⬆), el Vankuvero, Kanado, en la jaro 1998. Ili rakontas al ni la plej interesajn kaj amuzajn noticojn en esperanto.

Ĉi tiu radio estas nur interreta; ĝin vi povas rekte elŝuti el ĝia retejo, aŭ ĝin aboni podkaste. En la programoj, krom pensigajn kaj surprizajn noticojn, vi povas ankaŭ ridi pri ŝercoj, aŭdi muzikon… ĉion en esperanto. Kelkajn erojn alsendas kontribuantoj, kaj ankaŭ vi povas kontribui sendante vian registraĵon, kiu povas esti pri io ajn. La daŭro de ĉiu programo varias inter ĉ. 10 kaj 20 minutoj. Eblas elŝuti ankaŭ malnovajn programojn (formato mp3: http://radioverda.com/rv001-rv099/ kaj http://radioverda.com/rv100plus/) el la longa historio de R.V., kiu aperas ĉ. 2 fojojn monate kun haltoj en 1999-2001 kaj 2001-2005, entute 188 eroj. Mi rekomendas Radion Verdan — aŭskultu kaj kontribuu! ***Marta***

BULTENO:

La tre malfrua aperigo de *NB*91 ebligis preskaŭ perfektan **senerarigon**: Sur pĝ.3 (kol.3, lin.4) troas spaco en "re gis"; "vera" estu "veraj" sur pĝ.34 (kol.2, lin.9), kie ankaŭ troas komo (kol.1, lin.3), kaj troas krampo kiel la lasta signo sur pĝ.33. Pli grave, la foto sur pĝ.9 montras jes Zamenhoffeston en *S.P.N.*, sed tiun en 2005 (*NB*89:9), ne en 2009! Ankaŭ troviĝis "nova" eraro en malnova *NB*87 — mencio pri neekzistanta municipo *Sacavém* anstataŭ *Loures* (pĝ.11, kol.2, lin.9-10). ***red***

OPINIO:


# *Sensaci' civita*

***António Martins-Tuválkin***

Manke de novaĵo pli suka, la iam sendependa *Heroldo de Esperanto* turnis sian atenton en 2008 (*) al la skribreguloj de "nia" lingvo. Langon mordu tamen draŝontoj supozantaj ke pri "pracelismaj **ortografiaj** obsedoj" okupiĝas la civita papertrumpeto — jen temas ja pri la **portugallingva** skribregularo, ŝanĝita en 1990 kaj finfine ekuzata nune. Efikas imprese ĉe ajna kleremulo ekz. groenlanda aŭ vjetnamia ke esperant-lingva kaj -kultura organo tiel inter-(eĉ super-, trans-!)-naciece okupiĝas pri tiaj samtempe teknikaj kaj kulturaj demandoj. Portugallingvanoj klarvidaj male veas pri la sensacieca kaj kruda priskribo de (por ni) konata afero, pri kiu la citita titolo estas sufiĉa resumo: Ĝi subas eĉ la nivelon de Lúcia Lepecki, António Emiliano, aŭ Graça Moura, ĉar anstataŭ tamen debateblajn punktojn pri konservado de etimspuroj aŭ de senakcentaj vokalvaloroj, la teksto en *HdE* regurdas pri kvanto de ŝanĝotaj vortformoj en ambaŭ atlantikaj bordoj kaj supraĵece konkludas ke jen kompletas ia konkerplano iniciatita de *Gabriela, cinam/kariofila*… Sekvan fojon kiam *HdE* doktumos profundece pri altkultura temo ekz. groenlanda aŭ vjetnamia, tiam mi certe memoros tion ĉi. (Dume notindas ke en neniu portugallingva lando civitismo/silferismo popularas, eĉ post la ĵusa kabinda aventuro…)

* Noor Weg: "En Portugalio oni skribos brazile" *Heroldo de Esperanto* **2122** (2008.05.8-31). Kopiita senkomente ĉe http://www.jjmariano.com/novajoj.asp?novajoj=portugalio. Laŭdire Noor Weg estas kaŝnomo de Giorgio Silfer.

# Malfrua post promesoj kaj anoncoj*, ekaĉeteblas noveldone en 2012 ankaŭ
# la portugala-esperanta vortaro de A.S.Almeida!




858 pĝ. 36 mil kapv. 1400 g 32,00 € ★ 04.037 ISBN 978-972-9471-37-7

Po unu el ambaŭ vortaroj +ekspedo: 56,00€ (nur al Portugalio)
aŭ mendu sampreze rete el www.lulu.com/product/14834137
kaj www.lulu.com/product/14834137

***Libro-servoj kaj eldonejoj kontaktu vendejo@esperanto.pt por pluropaj mendoj kaj ebleco pagi per varinterŝanĝo.***

*NB**91**:30


nº de sócio — *annumero*
últ. quota paga — *lasta kotizpago*
foto — *foto*

*laste ricevita interŝanĝnumero*

DESTINATÁRIO:


REMETENTE:
**Associação Portuguesa de Esperanto**
Rua Dr. João Couto, 6-r/c A
PT-1500-239 LISBOA
Portugal